

## REDAKTORA VORTO



★

Ekde finaŭgusto ĝis finoktobro  
oni interrete (tra la mondo, do)  
ĝojinformadis kiel okazendan fakton,  
ke Esperanto revenas la antikvan  
Vilnan Universitaton.  
Ke la lingvon en la universitata  
Instituto de fremdlingvoj  
ekinstruos V. Degėsys.  
Reeĥe venis ĝojaprobaj de kelkaj  
eksterlandaj gravuloj.  
Ho ve, neni universitata E-kurso  
startis ĝis nun.  
Ni ne analizu eblan kialon  
(financan, organizan aŭ pedagogian).  
Gravas alio –  
iuj emas raporti ne pri okazintaĵoj,  
sed pri eblaj **ontaĵoj**.  
La proverbo asertas:  
“komenco bona – laboro duona”.  
Oni okazigu do  
almenaŭ trionon de la kurso  
kaj nur tiam komencu fanfaroni.  
La dirito validas por ĉiu ajn branĉo  
de nia E-agado.  
Ni atentu tion, ja alie ni similos al la  
monde konata  
soveta komunisto Ĥruĉĉov,  
kiu promesis konstrui komunismon eĉ  
en Usono  
kaj anoncis la jaron de la efektiviĝo.  
Pri la fino ni ĉiuj bone scias ...

★

Vytautas Šilas /*Vi:taŭtas Ŝilas*

# LITOVA STELO

Lietuvos žvaigždė

N-ro 5 (195)

septembro – oktobro 2010, XX jaro

## ENHAVO

- 2** Kubo: UK kaj la lando  
**8** Pri fajna litova biero  
S. GALADAUSKAS
- 12** Infanoj de Vilija  
V. JAKŠTIENĖ  
**15** Pola prezidento kaj Litovio  
**17** Bonvenon al BET en Latvio  
**18** Vizito al Burokrataro Bruselo  
**21** J. Brodskij al T. Venclova  
**23** *Ŝtelisto*  
J. SAVICKIS  
**25** Skribu al mi  
**26** *Legu do*  
SEN RODIN  
**27** Portreto en sinagogo  
**28** Al UK de Esperanto en Danio  
**28** Biera kanto *Trinku, gastoj!*  
**30** E-mozaiko  
**31** Ridetu kune  
**32** Abono al *Litova stelo*

### La fotoj sur la kovrilaj paĝoj –

sur la 1a – de Virginija VALUCKIENĖ  
sur la 2a – de Rusnė JAKŠTAITĖ-  
HRABOVSKYI  
sur la 3a kaj la 4a – de Stasys PAŠKEVIČIUS

## KUBO: LA KONGRESO KAJ LA LANDO



Partopreni la 95-an Univer-salan Kongreson de Esperanto en Havano estis mia la plej granda revo. Ĝin efektiviĝi helpis miaj karegaj proksimuloj. Kaj jen mi flugas en Havanon tra Londono. En Kubon el Litovio ni flugis kvarope, kaj en la tristela hotelo "Neptun-Triton" ni loĝis trio-pe. En la flughaveno ni estis renkontitaj kaj transportitaj en hotelon senpage. La transportado inter hoteloj kie loĝis gekongresanoj kaj la kongresejo estis senpaga: matene tien, posttagmeze reen kaj tien-reen por la vesperaj aranĝoj. En nia hotelo loĝis multaj esperantistoj. Ni konatiĝis kun japana geedza paro H. kaj Y. Yamamoto, kun patro kaj filo el Baŝkirio, niaj karaj landnajbaroj - latvoj kaj amikiĝis kun ĉiuj ili.

La palaco de la kongresejo estis belega. La inaŭgura malfermo de la kongreso estis solena. Litovan esperantistaron reprezentis la estrarano de LEA Arimantas Raĉkauskas. Li salutis la kongresanojn. Mi volis lin foti, tamen mi ne sukcesis. Tre originale nin salutis reprezentatino el Kirgizio. Ŝia saluto estis bela kanto; ni tondre al ŝi aplaŭdis. La festo daŭris. En promensalono ni alparolis esperantiston vestitan per naciaj vestoj. Tiulo estis serbo Momĉilo Kristiĉ. Ni amikiĝis kun li, renkontiĝadis dum la matenmanĝoj kaj kune vojaĝadis el hotelo en la kongresejon.



*La solena inaŭguro de la kongreso en la Kongresa Palaco de Havano*

Mi kun Genovaitė Olšauskienė el Vilno, kiel scivolemaj emeritulinoj, klopodis partopreni ĉie. Jen dum la kongresa semajno la geinstruistoj Ariadna Garcia kaj Matthias Humet gvidis kurson pri la mondfama kuba danco "Salsa". Ni ĉeestis la kurson. Kune kun Genutė (*Genjo*) ni ĉeestis ankaŭ la kunvenon pri la kongresa temo: *Interproksimiĝo de Kulturoj*. La temo ne estis hazarda – la ĝenerala asembleo de UN ja proklamis la jaron 2010 *La internacia Jaro de proksimiĝoj de kulturoj*. Okazis disputo: kion signifas kultura "proksimiĝo" aŭ "interproksimiĝo"? Ni gape sidis kiel "floroj", sed la liston de la partoprenantoj ni enskribiĝis la unuaj. Dum la lekcio de Spiritisma Asocio F.V.Lorenz ni gajnis la libron "Almanako Lorenz 2010", rigardis lumbildojn. Estis tre interese. Mi mem vizitis ĉiujn koncertojn de la ensemblo "Kabaredo".

Vespere en la "Teatro Nacional" ni spektis ĉarman spektaklon "Rememoro de unu aktoro" kaj bonegan ludon de serba aktoro – rememoroj el diversaj UK, en kiuj li partoprenis. Poste ni spektis "Teatron de la Absurdo" – la leciono de Eugene Jonesco, ĝin ludis Giuliano Turone kaj Katia Ignatieva. Ni konatiĝis kaj interŝanĝis per adresoj kun s-ino Maria de los Angeles Gil Gomez. Ŝi kun doktorino Albania Duthil Alvarez organis sinprezenton de kubanaj infanoj – estis mirinde.

Nin agrable mirigis sincereco, bonvolemo kaj helpemo de lokaj loĝantoj. Foje ni ne sciis vojon en la hotelon el kongresejo. Ni ekvidis kelkajn laboristinojn kaj demandis pri la vojo. Unu virino post laboro iris hejmen, sed ŝi apartiĝis kaj nin akompanis ĝis jam konata por ni loko, preskaŭ ĝis la hotelo. Ni volis rekompenci ŝin, sed ŝi ĝentile rifuzis. Do, ni nur fotiĝis kun ŝi. Tamen en la hotelo mem laboris tute aliaj homoj – veraj rabuloj.

Ni multe promenadis tra Havana. En la malnova urbo estis belaj duetaĝaj tipe hispanaj vilaoj, tamen nur maloftaj el ili estis restaŭritaj. Ni ne vidis almozulojn, alkoholulojn. La virinoj estis tre bele vestitaj, ornamigitaj, la infanoj dorlotitaj. La studado kaj kuracado en Kubo estas senpagaj. Ni renkontis kelkajn studentojn, kiuj studis en Havano medicinon kaj post la ekzamenoj pre-




*Eugenija Novikova en la impresa Havano*

tis reveni hejmen al Botsvana respubliko, en Afrikon. Almutè (Alma Ŝlamaitè) fotiĝis kun ili. Ni ekskursis en la valon *Viñalis* (la kosto - 46 €). La valo, ĉirkaŭita de montaro, ekde 1999 estas en la listo de Naturaj heredaĵoj de Unesko kaj estas unu el la plej belaj naturaj vidindaĵoj de la insulo. Por kultivado de ĉiaspecaj vegetaĵoj oni uzas tradiciajn metodojn. Kafo kaj tabako tie abundas. Ni aĉetis pardonace kafon kaj cigarojn. Aliaj mirindaĵoj de la valo estas ĝiaj kavernoj, kiuj etendiĝas kelkajn dekojn da kilometroj. Oni al ni montris la ĝeneralan bildon de la valo, desegnititan sur roka muro. Ni eniris en unu el la viziteblaj kavernoj. Tie ludis ensemblo de kubanoj. Ankaŭ tie ni tagmanĝis, ĉar tagmanĝo estis inkluzivigita en la ekskursan koston.

La dua ekskurso estis la populara "Vojo de Hemingway". Ni vizitis lian bienon. En la fiŝista vilaĝo *Cojimar* mi fottadis ĉe la monumento al E. Hemingway. Ni promenadis tra la malnova Havano, tamen ni ne sukcesis viziti la restoracion "El Floridita", ĉar ĝi estis fermita. Jen tial ni ne gustumis la faman koktelon "Mochito", kiun tiel ŝatis la mond-fama verkisto. Bedaŭrinde.

En Kubo nin indignis la valuta kurso – unu por lokaj loĝantoj, alia por gastoj. Tamen ĝenerale la vojaĝo al mi tre plaĉis, la mirinda naturo de insulo, varma akvo de Kariba maro. Pro la efektiviginta revo mi estas tre dankema al miaj proksimuloj, al sinjorino Irena Alijoŝiūtè kaj prezidanto de LEA sinjoro Povilas Jegorovas, kiuj organizis la vojaĝon. Mi sendas al ili mian sinceran dankon kaj bondeziras al ĉiuj ili bonan sanon.



*Similas al Lenin, sed Hemingway!*

*Eugenija Novikova,  
Panevėžys, E-klubo "Revo"*

## FLUGO AL SOCIALISMA PARADIZO

Multaj litovaj esperantistoj revis ekvidi ekzotan latinamerikan landon Kubon. Ni scivolis ankaŭ kompari iam sovetan Litovion kun nuntempa socialisma Kubo. Tamen multaj el ni, pro multekostaj flugoj kaj hoteloj, ne povis permesi al si la vojaĝon. Tiujn, kiuj hezitis iri Kubon aŭ ne, la esperantista animo Irena Alijoŝiūtè konvinkis, ke eĉ pli ol ekzota naturo gravas interkomunikado, novaj konatecoj. Krome ĉiu vojaĝo ja promesas ankaŭ diversajn neatenditajn surprizojn. Tiel fine formiĝis litova okopo de decidiĝintoj veni al la 95-a Universala Kongreso de Esperanto en Kubo. Iris do trans la oceanon –

Arimantas Račkauskas, Eugenija Novikova, Genovaitė Olšauskienė, Bronislovas Butkauskas, Vida Lašienė, Alma Šlamaitė, Emilija Rapkevičiūtė, Lidija Gomolickaitė.



*De dekstre: A.Račkauskas, E.Rapkevičiūtė, A.Šlamaitė, B.Butkauskas, E.Novikova, G.Olšauskienė*

Zorgoj ne mankis. Komence ni antaŭmendis lokojn en Havanaj hoteloj kaj por ekskursoj. Poste ni devis iel ricevi plej malmultekostajn biletojn por la flugo Londono-Havano kaj reen. Irena mendis por ni biletojn, kiuj kostis nur po 1800 Lidojn (520 €). Ni ordigis vizojn, asekuris nian sanon. Vere, ni malsukcesis pri mal-multekostaj biletoj por la flugo Kaŭno-Londono. Kulpis ni mem – ankaŭ pri tio ni devis zorgi anticipe.

La 14-an de julio ni forflugis el *Karmelava*-flughaveno kaj post kelkaj horoj atingis Anglion. Angloj tie iom difektis nian humoron: en Londono ni estis tre zor-geme kontrolitaj. Ĉiu pasaĝero estis ĉirkaŭita de kelkaj kontrolistoj, estis pripalpata, senŝuigata; mi komprenas kiom danĝeras minaco de terorismo ... Sekvan tagon ni forflugis el Londono kaj nokte atingis la Kuban ĉefurbon Havano. Ni refoje estis prikontrolitaj kaj fotitaj. Post la trapaso de ĉia kontrolado ni ekvidis membrojn de UEA. Ni tuj estis veturigitaj al hotelo kaj tie akceptitaj por tranoktado.

Ni loĝis tute proksime de Kariba maro, en Havana hotela kvartalo destinita nur por eksterlandanoj, patrolata de polico. La regiono estis tre ordigita, kun florantaj grandegaj arboj palmoj-belulinoj. Sonis la hispana lingvo, neniuj deziris kun ni paroli la rusan, kiun ni ja scipovis. Policanoj kaj militistoj surstrate kun eŭropanoj penis komunikiĝi angle. Tamen ĉie distingiĝis la deziro de multaj kubanoj eluzi eŭriopanojn negococete. Jen dum la stratpromenado prosimiĝas taksio kaj oni proponas la multekos-



tan servon – veturi per ĝi. Kiam al Havana centro vi venas per poreksterlandana ekskursata buso, vin tuj ĉirkaŭas nigrohaŭtuloj kun sinpropono pentri vian portreton aŭ foti vin, kun propono ĉevalveturigi vin. Ĉe la strando unu kubano proponegis veturigon tra la lando kontraŭ 500 €!

La ĉiĉerono, kiu nin akompanis dum ekskursaj tagoj, longe rakontis al ni, ke la studado kaj kuracado en Kubo estas senpaga. Kiam ekmalsanis unu nia kolegino kaj trafis al hospitalo, ni havis okazon viziti malsa-nulejon destinitan ... por ekster-landanoj. La impresoj estis impona – la ĉirkaŭaĵo estis purorda, en vestibloj ni vidis florarojn. La kuŝĉambroj, destinita por unu aŭ du malsanuloj, enhavis tutan necesan aparataron, duŝejon, ne-cesejon. La malsanuloj kuŝis sur rulmovaj litoj kaj estis prizorgitaj je ĉiuj plej necesaj kuraciloj.



*Kun kubano, de dekstre: A.Ŝlamaitė kaj E.Novikova*

Promenante tra Havano, ekskursante tra la lando ni vidis ne nur palmojn kaj bananajn plantejojn, hispan-arkitekturajn konstruaĵojn (multaj tre neprizorgitaj). Ni vidis ankaŭ restaĵojn de soveta tempo: betonitan Revolucionan placon, bustojn de revo-luciuloj, cementajn porelektrajn fostojn, multenombrajn sovetajn aŭtomobilojn “Volga”, “Ĵiguli”, “Moskviĉ”, traktorojn “Belorus”.

Ni flugis al socialisma lando, tamen veran socialismon ni tie ne rimarkis. Ni vidis kvartalojn de riĉuloj kaj de mizeruloj. Varoj estis tre multekostaj, ilia elekto tre malabunda. Post longa serĉado de Kuba kafo kaj Kubaj cigaroj ni trovis tion nur en vendejo, destinita por eksterlandanoj. Tamen, mi konfesu, antaŭ la vojaĝo mi imagis Kubon la lando eĉ pli malriĉa, pli mizeraspekta ol ĝi estis efektive.

*Alma Ŝlamaitė*

## EN LA LANDO DE KUBANOJ

Revenis mi el Kubo kun diversaj impresoj. Bone impresis la kongreso kaj kongresanoj. Tamen pleje min interesis Kuba ekzoto, klimato kaj homoj. Foje, anko-raŭ dum soveta tempo, aperis okazo viziti Kubon, sed la ŝancon mi ne sukcesis eluzi. Antaŭ du jaroj mi eksciis pri okazonta Havana kongreso kaj dum tiuj du jaroj preparis min por la vojaĝo. Nenio povas anstataŭi tion, kion mi ekvidis kaj spertis.

Mi loĝis en la hotelo “Bruzon”, ne malproksime de la Revolucia placo kaj Nacia teatro, fakte en la urbocentro. En la hotelo mi loĝis sola eksterlandano kaj sola esperantistino. Min interesis la kubana parolado. Mi kunhavis litovan-hispanan vortaron.

Ĝi helpis al mi interkompreniĝi en la hotelo kaj en la urbo. En la hotelo loĝis germanino, kiu vivas en Kubo jam dum 30 jaroj. Kun ŝi mi parolis germane – tiel utilis la lernejaj scioj pri la germana.

Mi volis kiel eble plej rapide ekvidi la Kariban maron. Sufiĉe longe mi iris laŭ la bordo kiun faris grandegaj akirandaj ŝtonoj. Mi iom malproksimiĝis de la bordo kaj ... devojiĝis. Mi kunhavis mapon, sed tie mi ne povis trovi mian lokon. Komenciĝis forta pluvo. Mi provis stopi taksiojn, sed ili ne haltis. Mi petis al viro, kiu pretis enaŭtiĝi. Li veturigis min ĝis la hotelo “Bruzon” kaj rifuzis preni la pagon.

Cetere, mia hotelo estis je 25 km de la kongresejo. Ĉiuj kubanoj proponadis uzi taksion, sed mi al la kongresejo veturadis per buso. La busoj estas plenplenaj de homoj, ludas laŭta muziko, sed malmulte kostas. Oni pripagas la veturadon per preskaŭ senvaloraj Pesoj (por eksterlandanoj oni ilian monon ŝanĝas al konverteblaj Pesoj). La perbusa veturado estas longa kaj iom laciga, sed mi povis spekti tutan Havanon kun mirinde bela arkitekturo. Ho ve, vidi la konstruaĵojn iam estis dolorige, ĉar multaj el ili estis forlasitaj, neprizorgitaj kaj ŝajnis eĉ trampejoj. Kontraste – ĉirkaŭ la hoteloj (kun klimatigiloj kaj basenoj) estis bonorde kaj pure ...



*De dekstre: dominikano Rafael, G.Olšauskienė, kubano Noel*

Memkompreneble, mi partoprenis ankaŭ diversajn kongresajn aranĝojn. Oficialajn kaj ne. Jen unu japana esperantisto demonstris muzikajn instrumentojn de diversaj popoloj. La japana instruista grupo instruis la artan paperfaldadon “Origami”. Mi ĉeestis en la grupo, kiu ellaboradis proponojn, kiel esperantistoj povus kunlabori kun UNESCO. Sed la plej agrablis vizitadi dancleciojn de “salso” (post la dancado koncertis ensemblo “Kabaredo”).

Resume, en mia memoro restis ne nur la kongresa etoso, sed ankaŭ divers-rasaj kubanoj, ilia afabla sincereco.

Mi faris du ekskursojn. Unu duontagan – laŭ la itinero de Hemingway (la prezo - 22 €). Ni vizitis lian bienon-muzeon kun impona biblioteko. Apud la konstruaĵo staris turo kun teleskopo per kiu la verkisto observis la ĉie-lon. Ni vizitis kafejon, kie li trinkis la koktelson “Mochito”. La dua, tut-taga, estis al la ĉefa Kuba kurorto Varadero ĉe la oceano kun preskaŭ 20-kilometra sabla strando (ĝi kosis 30 €).

*Genovaitė Olšauskienė*

## PRI FAJNA LITOVA BIERO PREZIDENTO SAULIUS GALADAUSKAS

*Prezidento de la Litova Gildo de Bierfarantoj – ekde 2009 (litove: Lietuvos Aludarių Gildija), Saulius Galadauskas /Saulius Galadauskas naskiĝis en 1959 en urbo Panevėžys. En 1979 li finis la Kaŭnan Aplikoartan Kolegion kaj dum 1990-1994 studis juron en Vilna Universitato. En 2006 li magistriĝis pri entreprena administrado en Baltia Meneĝa Instituto. Inter 1996-2003 S. Galadauskas laboris en administraj struk-turoj de Coca-Cola Baltic. Dum 2004-2008 li funkciis kiel viceprezidento kaj direktoro pri korporaciaj aferoj en holdingo BBH Baltic/Carsberg Baltic. Saulius Galadauskas volonte respondis demandojn de nia revuo.*



### **Oni diras, ke Germanio, Ĉekio kaj ankoraŭ, eble, Danio estas bieraj landoj? Kaj kiel pri Litovio?**

Litovio havas delongan bieran tradicion. La unuan fojon bieron oni mencias en manuskriptoj de XV jarcento, kiam sur la teritorio de Litovio Minora (alie – Prusia Litovio) estis reglamentita ĝia trinkado. Sen kia ajn dubo biero estis bone konata en la antikva, pagana Litovio. Ja la litova nomo de ĉi tiu trinkaĵo “alus” originas el la vorto “alu” de la hindoeŭropa pralingvo, kiu signifis bieran trinkaĵon. En profunda pasinto ĝi estis rita, ne ĉiutaga, trinkaĵo. La ĝerموj de industria produktado de biero atingas XVI jarcenton, kiam en litovaj urbetoj aperis malgrandaj bierfarejoj. En 1784 fondiĝis bierproduktejo en la urbo *Klaipėda* (ĝi estas konata laŭ la nomo *Švyturys*), kaj en 1786 en la urbo *Šiauliai* (nun produktejo *Gubernija*). Tiel komenciĝis efektiva industria produktado de biero en Litovio. Nun en Litovio kun iom pli ol 3 milionoj da loĝantoj oni vendas ĉirkaŭ 300 milionojn da litroj de biero, en bierfaraj entreprenoj laboras ĉirkaŭ 2 mil laborantoj, ankoraŭ 4700 laboras en entreprenoj, kiuj liveras krudaĵojn por bierfarantoj. Entute en la litovaj entreprenoj, ligitaj kun produktado kaj vendado de biero, laboras ĉirkaŭ 15600 personoj. La biera industrio de Litovio ĉiujare konsumas 60 mil tunojn da malto, preskaŭ 80 mil tunojn da malta hordeo. La kreski-kreskigita en Litovio malta hordeo estas plene utiligata por bierfarado Tiel do estas centoj da laborlokoj ankaŭ en la litova vilaĝo.





### **Vi estas Prezidento de Litova Gildo de Bierfarantoj. Kion ĝi faras, kiuj estas membroj de la Gildo?**

La Gildo strebas, ke en Litovio oni pli multe da atento turnu al kvalito de biero, kiel al ekologia trinkaĵo. Ni postulas de niaj membroj obei ĉiujn normojn de etika entreprenado, de honestaj financaj procedoj, plenumadon de laboratoria kontrolo de bier-produktado. Ni deziras, ke nian bieron oni traktu ne nur kiel alkohola trinkaĵo (ja malforta), sed ankaŭ kiel tia, kiun diference de vodko, laŭ la

patriarko pri normigo de litova lingvo J. Jablonskis, “trinki estas sanutile”. Niaj membroj estas la plej grandaj kaj malnovaj litovaj bierproduktejoj “Švyturys”, “Kalnapilis”, “Tauras”, “Ragutis”, “Gubernija”, “Rinkuškiai”. Ni invitis membriĝi en la Gildo ankaŭ pli etajn bierfarejojn.

### **Ĉu la Gildo flegas litovajn bierfarajn tradiciojn?**

Kompreneble, jes! Ekde antikvo en litova komunumo la profesio de bierfaranto estis unu el la plej honoraj. La antaŭulo de la Litova Gildo de Bierfarantoj estas la Vilna maltofarista gildo, fondita ankoraŭ en 1552, kiam la grandduko de Litovia duklando Zigismundo Aŭgusto konfirmis ties fondodokumenton. Sen biero okazadis neniu litova baptado, nupto, sepulto, finfesto de terlaborado. En litova vilaĝo, precipe en norda Litovio, ankoraŭ postrestis unika en Eŭropo vilaĝa bierfara tradicio. En Litovio ofte estis tiel, ke gefiloj aŭ genepoj de rekonaj vilaĝaj bierfarantoj fariĝis bierfarantoj, teknologistoj aŭ gvidantoj de industriaj bierfarejoj. Tio ebligis la adopton de litovaj bierfaraj sekretoj en entreprenoj de moderna bierfarado. Cetere, la etaj bierfarejoj, produktantaj malgrandajn stokojn povas permesi al si ofte variigi bieron pri ties gustaj ecoj, pri forteco kaj tiel trovi sian uzanton. Litova biero estas nia nacia valoro pri kiu ni fieras.

### **Kiel elstaras entreprenoj de la Litova Gildo de Bierfarantoj inter litovaj nutraĵaj entreprenoj?**

La biero produktata en Litovio estas nature maturigita, pretigata el la samaj ingrediencoj kiel antaŭ jarcentoj – el ekologiaj hordea aŭ tritika malto, lupolo, litova akvo kaj speciale aranĝita biergisto. Ni uzas neniujn konservilojn, neniujn sintetikajn kompletigaĵojn. Dum la lastaj jaroj litovaj bierfarantoj kreis kaj perfektigis bierproduktadon de multaj specoj – ekde la hela Lager kaj Pilsner, de tritika biero, de litova malhela kaj de Porter. La atingoj de litovaj bierfarantoj estas alte aprezataj en prestiĝaj konkursoj kaj la gastoj venintaj Litovion ege laŭdas litovan bieron.

Litova biero estas eksportata al 25 landoj de la mondo – ekde fora Aŭstralio, Kanado, Usono ĝis la proksimaj eŭropaj landoj Svedio, Finnlando, Norvegio, Danio, Pollando, Hispanio, Italio, Francio, Islando, Bulgario, Germanio, Nederlando kaj Cipro, ankaŭ Latvio, Estonio, Kartvelio, Ukrainio, Belarusio, Israelo. Plej multe da litova biero iras al Britio, Irlando, Hispanio kaj Rusio.

**En Litovio oni vendas kelkdek specojn da biero – la litovan kaj la importan.  
Kiun bieron vi rekomendus por trinkado al niaj homoj?**

La ĉefa regulo estas – la bieron oni devas trinki en la lando, kie ĝi estas produktata. Sekve, en Litovio oni devus trinki nur la litovan. Kiun konkrete – estas afero de ŝato. La plej saniga estas la barela biero. Ĝia valida termino estas 20 tagoj, ĝin oni titolas “viva”. En Litovio kaj ekzemple en Germanio la botela biero validas 6 monatojn (ĝi estas pasteŭrita). Ankaŭ ĝin oni povas konsideri “viva”. Tamen, por eksporto al aliaj landoj de Eŭropa Unio validas la postulo, ke la biero uzeblu almenaŭ unu jaron (reale 1,5 aŭ eĉ 2 jarojn). Tio eblas nur se estas uzitaj konserviloj. Sekve, en Litovio la eks-terlandan bieron ni trinkas kun konserviloj. Konkludojn faru mem.



*Ĵurnalista ekskurso al la plej ampleksa litova bierfarejo „Švyturio-Utenos alus“ en la urbo Utena. Centre staras S.Galadauskas. Apud li la membroj de Litova Esperantista Ĵurnalista Asocio (LEĴA): liven – A.Antanaitis kaj T.Šilienė, dekstren – V.Šilas, J.Antanaitienė kaj V.Žeimantas. Foto de Virginija Valuckienė, membro de LEĴA*

**La demando por la finparolo, kiun ricevas ja ĉiu gasto de nia revuo – ĉu vi iam renkontiĝis kun Esperanto, kiun opinion Vi havas pri ĝi? Kaj ankoraŭ – en Litovio oni kreas novajn specojn de bieroj. Eble iu el ili, kiun vi ŝatus eksporti, povus ricevi “internacian” nomon, jen ekzemple „Nova biero“ (naujas alus), „Mirinda“ (nuostabus), „Amiko“ (bičiulis) aŭ simile?**

Mi estas konata kun Audrys Antanaitis – ĵurnalisto esperantisto. Al li kaj al lia ŝata lingvo Esperanto mi deziras la plej bonajn perspektivojn. Pri iu esperanta nomo por iu litova biero? Kial ne! Mi povus tion proponi al miaj kolegoj bierfarantoj.

*Interparolis: Vytautas Šilas*



*Freŝe !!!*

## SUKCESA SIMPOZIO EN NOVJORKO

La 15-an de decembro 2010 en Novjorko okazis speciala simpozio “**From Zamenhof to Soros**”. Kvin esperantistoj renkontiĝis antaŭ la ĉefa programo en renkontiĝa ĉambro de Departmento de Publikaj Aferoj de UNO. Por la simpozio mem kunvenis deko da ĵurnalistoj; unu el ili reprezentis *The New York Times*. Ankaŭ deko da universitataj studentoj (pluraj verkantoj pri Esperanto). Ĉeestis tri el la plej aktivaj reprezentantoj de Ne-registaraj organizoj ĉe UNO. Entute ĉeestis pli ol 70 personoj, inter ili pli ol 10 konataj Esperantistoj. Venis du membroj el unu el la plej famaj familioj en Usono, la familio Soros.

George Soros ĉeestis eble dum horo. Li prelegetis dum 10-15 minutoj. Dum la pliparto de la programo ĉeestis Jonathan Soros, nepo de nia fama Teodoro Soros. Prelegis Ralph Dumain, Esther Schor, Sam Green. Du novaj grandaj ekranoj estis uzitaj dum du prelegoj (power-point aŭ filmo-montrado). Humphrey Tonkin donacis al la familio Soros la novan eldonon/tradukon de libro de Teodoro Soros. Funkciis ekspozicia tablo kaj aparta tablo por libro-vendado. Ambaŭ tabloj ricevis dekon da vizitoj. Pluraj libroj vendiĝis.

Dum la socia horo la novjorka esperantisto Jon Lichty, ludis agrablan muzikon. Unu universitata studentino profesie filmis la programon. Specialajn dankojn al Isis, Mary kaj Kaŝa pro la filmado. Mi intervjuiĝis (renkte al Brazilo) por Ligo de Bona Volo, angle kaj portugale. ([www.bonavolo.org](http://www.bonavolo.org)).

La senduba konkludo estas – la simpozio “**De ZAMENHOF ĝis SOROS**” estis sukcesego.

*Laŭ raporto de Neil Blonstein,  
UEA reprezentanto ĉe UNO/Novjorko*

## MIAJ INFANOJ KAJ ESPERANTO

Komencis mi kalkuli kiom da jaroj mi estas esperantistino. Estas jam 40! Jes, januare 1970 mi finis la kurson, kiun en la urbo *Kaunas* gvidis instruistino Antanina Baltrušienė.

La unuan fojon pri la lingvo Esperanto mi ekaŭdis de mia klasamikino. Estis printempo de la jaro 1970. Ŝi al leciono de germana lingvo venigis lernolibron de Petrus. Mi pruntis la libron kaj dum la somero transkribis en kajeron tutan gramatikon kaj ... aŭtune okazis 3-monata E-kurso!!! Tiam mi estis lernantino de lasta mezlerneja klaso. Mi lernis en unua grupo de A. Baltrušienė (en dua lernis mia fratino). Ni devis fini la lernadon antaŭ la Nova Jaro, sed ekmalŝanis la instruistino, tial ni finis la kurson en januaro 1971. Mi ankoraŭ rememoras, ke en la grupo mi estis la unua kiu ricevis leteron-respondon. Tio estis granda ĝojo kaj por mi kaj por la instruistino. En tiu letero la korespondamiko el Pollando nomis min "ĉarma Vilija". La instruistino tiun nomon bone fiksas kaj kiam dum Zemenhof-festo en 1971 oni "baptis" nin kaj min ŝi proponis bapti "Ĉarma". Mia baptopatro tiam estis la karmemora veterano Antanas Poška.

Fariĝinte entuziasma esperantistino, mi dum mia vivo en *Kaunas* kunhelpis organizi kelkajn Zamenhof-festojn, kunorganizis kun loka E-junularo renkontiĝojn "Aprilaj tentoj" kaj aŭtunan "Pomo". Organizis "Pomon" helpis eĉ miaj gepatroj, kiuj speciale veturis al vilaĝo, por alveturigi grandan sakon da pomoj.



Mi fariĝis infanĝardena edukistino. Ekde la jaro 1976 mi loĝas en la urbo *Klaipėda* kaj samtempe viglas en Esperanto, gvidas E-kursojn. En 1987 oni min elektis prezidantino de la urba E-klubo. Samjare la urba partia komitato permesis al mi kune kun estonta longjara kluba prezidanto Arūnas Kazlauskas, veturi al Hungario, por partopreni en forumo de ĝemelurboj, okazinta en Debreceno. Mi ricevis laborlokon en Pionira domo por gvidi E-rondeton, kaj ricevi salajron. Dum mi laboris en la urba Pionira domo (nun Junulara centro), miaj ĝelernantoj partoprenis en la

movado de la organizaĵo "Infanoj ĉirkaŭ la mondo". Iliaj pentritaj kaj skribaj sciigoj pri Litovio estis presitaj en Usono. Post kiam miajn gelernantojn vizitis korea ĵurnalisto esperantisto s-ro Choe Taesok (vidu la foton) pri ili skribis la okcidentlitovia gazeto "Vakaru ekspresas".



Pri Esperanto mi interesigis du miajn filojn kaj filinon, krom la edzo (tamen li partoprenis en multaj E-renkontiĝoj kaj alie helpis nin). En 1991 ili, la 14-jara Vilmantas kaj 11-jara Mingaudas partoprenis Internacian Infanan Kongreseton de UEA en Bergen (Norvegio). Mi mem laboris en la kongreseto, kaj ricevis bonan sperton kiel instruistino. Dum la norvegia kongreseto la filoj prezentis version de porinfana poeto Anzelmas Matutis "Tuj kaj morgaŭ" aktorante du strigidojn (kun helpo de eksterlandaj infanoj en la roloj de patrino, aŭtoro kaj tria strigido) kaj akiris bonan sukceson. En 1993 ni tutfamilie partoprenis Universalan Kongreson en Valensio (Hispanio). Mia 10-jara filineto Rusne tiam partoprenis la infanan kongreseton. Dum la hispana kongreseto la filino muzikludis per litova popola muzikinstrumento *kanklo* kaj miris pri la atento kun kiu oni aŭskultis ŝin. Ĝis nun kun Esperanto plej multe amikas Vilmantas. Li memstare partoprenis kelkajn E-renkontiĝojn. Mingaudas kaj Rusne ne estas tiom aktivaj.

Nun mi kun sesjaraj infanoj partoprenas en diversaj pentraĵaj konkursoj. La kristnaskan konkurson, kiun pasintjare en Trieste (Italio) organizis Itala E-Asocio, partoprenis cent 6-12-jaraj infanoj el dek unu landoj. Ankaŭ miaj edukitoj. Por la konkurso mi sendis originalan pentraĵon de mia lernanto el infanĝardeno "Bitutè", de la



sesjara Erikas. Estis sur nigra papero per dentpasto desegnita litova vintro. Mi ĝojas - la unuan laŭreatan diplomon gajnis nome li, mia lernanto!



Pasintomere dank` al mia filo Vilmantas elpost Bjalistoka UK al *Klaipėda* venis juna meksika aktivulo fraŭlo Danielo Moreno Martinez. Ĉar la filo laboris, mi kun la meksikano ekskursis tutan semajnon kaj poste akompanis lin ĝis latva *Liepaja*, kaj tie transdonis lin al alia esperantisto. Surfote – la gasto, mi kaj mia edzo.

*Vilija (Valaitytė) Jakštienė, Klaipėda*

\*\*\*\*\*

#### ABONAĴOJ POR 2011

Por la jaro 2011 Litova Esperanto Asocio peras abonon eĉ de 38 alilandaj E-periodaĵoj. Inter ili estas:

*HEROLDO DE ESPERANTO*, *FEMINA* kaj *LITERATURA FOIRO* (Svislando), *ESPERANTO*, *KONTAKTO*, *LINGVAJ PROBLEMOJ KAJ LINGVO-PLANADO*, *TEJO TUTMONDE* (Nederlando), *LA ONDO DE ESPERANTO*, *SCIENCO KAJ KULTURO*, *REGO* (Rusio), *KOSMOS* (Danlando), *MONATO* kaj *LA JARO* (Belgio), *DIA REGNO* (Germanio), *ESPERO KATOLIKA* (Italio), *JUNA AMIKO*, *INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO* (Hungario), *INTERNACIA MEDICINA REVUO* (Japanio), *BULGARA ESPERANTISTO* (Bulgario), *BRITA ESPERANTISTO* (Britio), *NORVEGA ESPERANTISTO* (Norvegio), *POLA ESPERANTISTO* (Pollando), *ISRAELA ESPERANTISTO* (Israelo), *TEMPO* kaj *ZAGREBA ESPERANTISTO* (Kroatio), *STARTO* (Ĉekio), *LA ESPERO* (Svedio), *LAŬTE* (Francio), *SIMPOZIO* (Brazilo)

## POLA PREZIDENTO - LITOVIO KAJ ESPERANTO

*La nova Prezidento de la Pola Respubliko Bronisław Komorowski la 6-an de aŭgusto 2010 transprenis la preziden-tadon. Jen post tiam la Ĝenerala Direktoro de UEA Osmo Buller sendis la mesaĝon dezirante al li "multe da sukceso en la plenumado de tiu respondeca tasko por la bono de Pollando kaj por la progresigo de harmonio kaj kunlaboro inter la popoloj".*



*B. Komarowski kun la edzino Anna. Foto de SCANPIX*

Litovio estas la norda najbaro de Pollando. La najbaro, kiu, ho ve, tra tuta XX jarcento devis multe suferi de la antaŭmilita esti ŝovinisma kaj orgojla Pollando, peninta fari Litovion sia provinco, likvidi la sendependecon de Litovio. La tempo kaj la rilatoj ŝanĝiĝas. Litovoj aŭguras el la prezidentiĝo de B. Komarowski plian pliboniĝon de la interŝtataj rilatoj. Li ja originas el Litovio kaj kompreneble rilatas al litovoj!

La praavoj de la Pola Prezidento, grafoj Komarowski enmigris en la Grandan Litovan Duklandon en XVII jarcento. Iliaj bienoj lokiĝis ambaŭflanke de la nuntempa litova-latva ŝtatlimo. La patro de la 58-jara Pola Prezidento, grafo Zygmunt Leon Komarowski, ankaŭ du liaj fratoj Bronisław Karol kaj Anton Krzysztof naskiĝis en bieno *Kavoliškis* (distrikto Rokiškis, Litovio). La praavo de la Prezidento, Zigmunt Leopold Petro Komarowski estas enterigita sur apuda negranda tumulo (en 1994 tie por li estis starigita kapelfosto kun pola kaj litova notoj). Cetere, B. Komarowski (laŭ la litova lingvotradicio li estus nomata *Kamarauskas*) rakontis, ke en *Kavoliškis*, kie naskiĝis lia patro, oni diradis, ke ne gravas kiom da tero vi posedas, gravas kiom da libroj vi havas. El Litovio devenas ankaŭ la prezidenta patrino, Jadwiga Komarowska. Estas interesa detalo: kiam la Litova Prezidentino Dalia Grybauskaitė per telefone pole gratulis al B. Komarowski pro lia prezidentiĝo, la pola kolego dankis al ŝi en litova lingvo!

Meze de aŭgusto la nova Pola Prezidento Bronisław kun sia edzino Anna ripozis en ripozurbeto Nida de superba Kurona terlanga (litove: *Kuršių Nerija*). Estas

eksterordinara kreaĵo de Naturo kaj de Homo, enskribita en 2000 la UNESCO- liston de protektendaj naturaj heredaĵoj. La geedzoj Komarowski loĝis ne en iu luksa kurorta hotelo, sed en loka tristela vilao. Ties mastrino estis agrable mirigita, kiam B. Komarowski jam la unuan tagon salutis ŝin litove (polaj politikistoj kaj diplomatoj, kutime, evitas diri eĉ vorton en la litova). "Dum matenmanĝoj li diradis iujn litovan frazojn kaj asertis, ke li preskaŭ komprenas litovlingvan parolon, nur ne kuraĝas provi konversacii en la litova. La honoraj gastoj sin miksis en la ripozantan homamason. Ili sunbruniĝis sur la mara strando, banis sin en la maro, biciklis. Ŝajnas neniu el la ripozantoj eĉ rekonis la prezidentan paron. Unutage la honorajn gastojn vizitis la Litova Prezidento Dalia Grybauskaitė. La paro estis kutre veturigita al la litova Venecio – la vilaĝo Minija, vizitis deltan insulon Rusnė (tiu famas pri etnografiaj fiŝkaptistaj bienetoj). B. Komarowski asertis, ke post fino de sia prezidenteco li tre dezirus denove viziti la Kuronan Terlangon.

La Direktoro de UEA en sia mesaĝo al la Pola Prezidento substrekis, ke "Estis granda honoro al ni pasintjare, ke Vi akceptis esti la Alta Protektanto de la 94-a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko, kiu estis la ĉefa evento por festi la 150-an datrevenon de la naskiĝo de D-ro L.L. Zamenhof, la kreinto de Esperanto". Li atentigis, ke la temo de tiu UK rilatis al la eldiro de D-ro Zamenhof, ke Esperanto celas krei pacan ponton inter la popoloj. O. Buller aldonis, ke la kongresanoj aprezis la mesaĝon de B. Komarowski al la UK, en kiu la Alta Protektanto referencis al tiu eldiro kaj konkludis: "La revo pri paco kaj sekureco estas aparte grava kaj signifa. La projekto krei universalan lingvon, kiu ebligu dialogon kaj kompreniĝon inter la popoloj, estas valora paŝo al la realigo de tiu ĉi revo." Litovaj esperantistoj esperas, ke B. Komarowski ankaŭ kiel Pola Prezidento favoros kaj pri Esperanto kaj pri la pola najbaro – pri Litovio.



*Vidaĵo de Kurona terlanga. Foto de Lokys el Labanoras*



## Bonvenon al la 47-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET- 47) okazantaj en Latvio

**Tempo:** BET-47 funkcios de la 9a ĝis la 16a de julio 2011.

**Loko:** BET-47 okazos en **Priekuļi** – vilaĝo situanta 7 kilometrojn orienten de Cēsis – unu el la plej belaj urboj de Latvio. Cēsis (fondita en 1206) situas en nordorienta parto de Latvio (87 km de Rigo), facile atingebla trajne kaj buse. **BET-ejo:** Agrikultura teknikumo de Priekuļi, Egļu gatve 9.

**La ĉeftemo de BET:** Folkloro tra jarcentoj

**Provizora programo:** diversnivelaj Esperanto-kursoj, enkonduka kurso en latvan lingvon, Somera Universitato, seminario pri problemoj de Esperanto-movado, Sankta Meso en Esperanto, Interkona, Nacia kaj Internacia Vesperoj, duontagaj kaj tuttaga ekskursoj, kvizoj, filmoj, kantoj, dancoj k. a. aranĝoj.

**Aliĝkotizo:** por aliĝantoj ĝis la 31.03.2011el Latvio, Litovio, Estonio - 20 € el “Ekssocialismaj” landoj - 25 € el ceteraj landoj 30 € Infanoj ĝis15-jaroj aliĝkotizon ne pagas. Lernantoj, studentoj, handikapuloj pagas 50% de la kotizo.

**Loĝado:** oni proponas jenajn loĝeblecojn:

- 1) po 5 €diurne por persono en dulita ĉambro en studenta hotelo de Agrikultura teknikumo (sen varmega akvo);
- 2) po 7-10 €diurne por persono en 4-7 lita ĉambro en hostelo “Priekuļi“, necesejo kaj duŝejo en koridoro;
- 3) po 12-15 €diurne por persono en dulita kaj trilita ĉambro en hostelo “Priekuļi“, necesejo kaj duŝejo en koridoro;
- 4) ekde 25-100 €diurne por persono en hoteloj de la urbo Cēsis.

**Aliĝo:** ricevu aliĝilon kaj la plenigitan sendu al: Latvia Esperanto-Asocio, p.k. 150, LV-1050, Riga, Latvio aŭ retadreso: [margarita.zelve@gmail.com](mailto:margarita.zelve@gmail.com).

**Kontaktelecoj:**

- 1) poŝte: Latvia Esperanto-Asocio, p.k. 150, LV-1050, Riga, Latvio
- 2) rete: [margarita.zelve@gmail.com](mailto:margarita.zelve@gmail.com)
- 3) telefone: + 371 26407174 (Margarita Ŝelve); + 371 28486628 (Biruta Rozenfelde)

**BONVENON** al la plej populara E-aranĝo en Baltmaraj landoj, la aranĝo kiu havas jam 50-jaran historion (la unua BET okazis en 1959 ĝuste en **Latvio**)!



## VIZITO AL BUROKRATARA EŬROPA CENTRO

Ĉiam kaj ĉiam kvazaŭ blasfemo sonas la esprimo "Bruselaj burokratoj". Nu, ni – du membroj de Litova Esperantista Ĵurnalista Asocio, Julia Antanaitienė kaj Vytautas Šilas vizitis ilian citadelon. Kune kun ni estis ankaŭ superba fotisto, kunlaboranto de "Litova Stelo", amiko de Esperanto do, Stasys Paškevičius.

Estis la 6-a de oktobro 2010. Tiam ni kun ankoraŭ 20 litovaj ĵurnalistoj venis al Brusela sidejo de Eŭropa Parlamento. Estas institucio, kie 736 parlamentanoj reprezentas 27 Eŭropajn ŝtatojn. Ĉiu el ili povas inviti po 50 siajn balotintojn por ke ili vizitu la parlamentejon. Nian vojaĝon ofertis la litova parlamentano, membro de socialdemokrata frakcio Zigmās Balčytis. La vojaĝaj elspezoj – la busa veturado, tranoktadoj en 2-4-stelaj hoteloj ankaŭ vespermanĝo-akcepto en Brusela restoracio estis pripagita, kompreneble, ne el la privata poŝo, sed el la parlamenta kaso. Cetere, la parlamentanoj por la vizitveno invitas ne kiun ajn, sed siajn partiajn adeptojn aŭ "bezonatajn" personojn, ekzemple, ĵurnalistojn de Litova Ĵurnalista Asocio (LĴS).

La ekskursojn tra la parlamentejo kun esplikoj en ĉiuj 23 oficialaj lingvoj de EU prizorgas ties Vizita kaj Seminaria Centro. Tra ĉiu jaro ĝi akceptas 275 mil vizitantojn, rakontas al ili pri laboro de la parlamento, okazigas renkontiĝojn kun certaj samlandaj eŭroparlamentanoj, ankaŭ vidigas la kunsidan salonegon.

Nin, esperantistojn, speciale interesis la lingva realo. Ĉiu parlamentano dum la plenkunsidoj rajtas paroli kaj ricevi informojn en sia ŝtata lingvo (unu el la 23). Tion plenumas armeo da tradukistoj kaj interpretistoj. Por efektiviĝi tradukon de kiu ajn oficiala lingvo al kiu ajn alia oficiala lingvo necesus ĝis 500 komunikaj tradukoj. Praktike ofte funkcias duŝtupa tradukado. El iu "malgranda" lingvo (ekzemple, la litova aŭ la bulgara) oni tradukas al iu punta "grandlingvo" (la angla, la franca aŭ germana) kaj jam de tiuj – al ceteraj lingvoj. Kaj se interpretisto de la unua ŝtupo estis malĝusta, la kolego de la dua ŝtupo ripetas la eraron (eĉ aldonas plian). Kurioze sonas reagoj al iu ŝerco aŭ spritaĵo uzita en la parolo. Komence ridas nur samlandaj gekolegoj, poste komprenintoj de la pontlingvo kaj laste – ĉiuj ceteraj. Sekve, iuj parlamentanoj por esti precize komprenitaj inklinas paroli ne sian ŝtatan lingvon, sed iun pontlingvon (plej ofte la anglan).

Eŭropan Parlamenton priservas 430 etataj interpretistoj kaj 700 tradukistoj (skribe, por posta dismultobligo de la tekstoj). Krome, oni havas rezervon de ĉirkaŭ 250 provizore dungotaj tradukistoj. Dum la plenkunsidoj "ŝvitas" eĉ 800-1000 interpretistoj! Kiom kostas ilia titana laboro? Oni ne povis sciigi nin pri preciza buĝeto de la tradukistaj servoj. Tamen, oni opiniis, ke ĝi povas fari preskaŭ 1/3 de la tuta parlamenta buĝeto, preskaŭ 500 milionojn da Eŭroj do!





*Parto de la ĵurnalista grupo en la kunsida salonego. De live: V.Jakimavičienė, S.Lukošiūtė, L.Senkus, J.Dovliasevič, A.Jakeliūnienė, Z.Balčytis, S.Paulauskienė, R.Lukšienė, L.Matulionienė, D.Karopčikienė, R.Jankuvienė, L.Kleišmantienė, V.Stasevičius*



*Aŭskultante informojn pri agado de Eŭroparlamento.  
En la unua vico de live: R.Jankuvienė, J.Antanaitienė, V.Šilas, V.Jakimavičienė*

La parlamentanoj pridiskutas kaj akceptas diversajn eŭropajn leĝojn (bezonatajn kaj ne tre). Ekzemple pri kurbeco de bananoj (!) ktp. Strange aspektas la decido malpermesi al ĉiĉeronoj iradi kun sialanda aŭ alia standardeto. En Eŭropo oni amase ekskursas. Tial por certigi, ke ekskursanoj ne perdiĝu en homamaso iliaj ĉiĉeronoj "anoncas" pri sia situo alte portante atentkoloran ombrelon, pinte ornamitan bastoneton, tabuleton kun ekskursnumero aŭ iun gvidlibron ktp.

Nun pri Eŭropa Parlamento kaj Esperanto. La baro por enkonduko de nia lingvo kiel la labora estas nacia egoismo de la grandlingvaj ŝtatoj. Ekzemplon? Bonvolu! Eŭropa Parlamento senbezone laboras en du apartaj urboj de du apartaj ŝtatoj. La plenkunsidoj (dum tri tagoj semajne) okazas en la franca Strasburo. Aldonaj plenkunsidoj kaj laboraj kunsidoj okazas en Bruselo. Tial la parlamentanoj (kaj interpretistoj) devas flugadi tien kaj reen. Krome, certa kvanto da oficistoj kaj burokratoj restas konstante en Strasburo. Tamen Francio obstine kontraŭas la lokigon de tuta parlamenta laboro en Bruselon. La obstino multe kostas por ĉiuj ni, kiuj pripagas la funkciadon de la parlamento.



*En la parlamentejo. De live: J.Antanaitienė, V.Šilas, T.Meiželis, parlamentano Z.Balčytis, J.Dovliasevič, S.Lukošiūtė, S.Paškevičius, A.Jakeliūnienė, V.Jakimavičienė, S.Paulauskienė*

Laŭvoje al kaj de vidinda Bruselo ni havis okazon ĝue ekskursi tra Berlino, Amsterdamo, Brugeo, Nurnbergo kaj Praho. Enbuse mi al miaj kunvojaĝantoj sendis kelkajn numerojn de "Litova Stelo" kaj poste respondis iom da ĝentilaj demandoj pri Esperanto. Bedaŭrinde, en neniuj el vizititaj urboj ni renkontis iun ajn spuron pri ekzisto de Esperanto, ekzisto de esperantistoj – forestis ajna ŝildo kun la verda stelo, la vorto "Esperanto" kaj adreso aŭ kontakta telefono de loka E-rondo aŭ informejo. Mian pozicion tute neatendite firmigis simpla bileta kontrolisto ĉe la baziliko de St. Jorgeno en Praho. Diveninte naciecon de la enirantoj, li ne nur markis la biletojn, sed ankaŭ salutis ilin en ilia lingvo (angle, itale, ruse, eĉ litove). Alproksimiĝinte mi laŭte diris: "Esperanto!". La kontrolisto reagis fulme: "bonan matenon, kara amiko!". Miaj gekolegoj ĵurnalistoj konstatis: "ho, en Praho oni tamen parolas Esperanton!".

*V. Šilas, fotoj de S. Paškevičius*



### **Joseph Brodsky**

1940 Leningrad – 1996 Novjorko  
juddevena rusa poeto  
laŭreato de literatura Nobelpremio  
inter 1966-1971 kvinfoje vizitis Litovion  
amikiĝis kun litova poeto T. Venclova

## **Litova divertimento (atrakciaro) Al Tomas Venclova**

### **1. Enkonduko**

Jen la modesta apudmara land'  
kun propra neĝo, propra flughaveno,  
kun propraj judoj, kun la bruna dom'  
de l' diktator'. Statuo de l' poet',  
kiu l' patrujon nomis amikino,  
kio atestis ne pri l' fajna gust',  
sed pri l' geografia sci': l' sudanoj  
sabate ja vizitas la nordanojn  
kaj, dum reven', piede en ebri'  
fojfoje trafas Okcidenton – temo  
por skeĉo. Kaj permesus la distanc',  
ĉi tie l'vivon por hermafroditoj.  
Tagmez' printempa. Flakoj kaj nubar',  
sennombra anĝelaro sur tegmentoj  
de l' preĝejar` sennombra, kaj la hom'  
iĝas viktimo de l' interpuŝad'  
aŭ nur partet' ĉi-loka de l' baroko.

#### 4. Blazono

Venkinta drakon Jegorio,  
en fandoforn' alegoria  
perdinte lancon, restis kun  
la glavo kaj ĉeval', kaj ĉie  
honeste ĉasas Litovie  
li nevideblan celon nun.

Postrajdas kiun li en muto?  
L' objekto de la persekuto  
sin kaŝas ekster la blazon'.  
Ĝi estas kio? Ĉu pagano?  
Ĉu l' tuta mond'? Ja lerta mano  
Vitolda regis sur la tron'.

#### 7. Dominikana \*

Vin turnu al sakstrat', al templo,  
flankita for de l' strata gaj',  
senhoma en ĉi tiu tempo,  
eniru, ekmeditu kaj  
en la aŭriklon de la Dio,  
fermitan' por la tag-rutin',  
nur kvar silabojn flustrokriu:  
- Pardonu min.

1971

\* temas pri Dominikana kirko en Vilno

**Jurgis Savickis**

*1890 en Litovio – 1952 en Francio,  
verkisto, antaŭmilito – diplomato*

**Ŝtelisto**

Kiel bone estas havi propran hejmon. La propra domo, varmo. La domo plena da homoj, ŝnurojn plektantaj. U-ta-ta, varme, bone! – Tiel povas pensi la homo, kiu kiel hundo forpelita tra la mondo vagaĉas.

En fumnigriĝinta kaj fumplena domo maljunaj homoj rakontis pri rabistoj el antikvaj tempoj, kiel ili ŝtelitajn ĉevalojn al arboj ligadis, kiel la ĉevaloj pro malsato la ŝelon ronĝis, kiel rabistoj bruligis per ardigitaj feraj vergoj la plandojn de pastroj.

La knabo, pritrancante tabuleton kaj dezirante el ĝi fari violonon, revis kaj aŭskultis.

– Ho, se venus nun rabisto tra la ĝardeneto neĝoplana...

La rabisto en imago de la knabo aspektis alta, afabla, belajn nigrajn vestojn portanta, kvazaŭ pastro kun brilaj galoŝoj. Kial lin tian imagis – la knabo ne sciis.

Hodiaŭ estas tago eksterordinara.

Ŝtelistoj forkondukis ĉevalon rekte el la stalo de la patro.

Kunvokinte helpojn kaj aranĝinte amasan traserĉadon, oni trovis la ĉevalon, kaptis la ŝteliston kaj ĵetinte lin sur fundaĵon de sledo, hejmen veturigis.

Hejmen veturiginte, oni alligis la ŝteliston en la domo al transversa apogtrabo, subpremanta konkavan muron. La ĉemizvestitan, la konscion perditan. Ŝnuroj estis profunde enranĉiĝintaj en la brakajn bicepsojn, la kapo kliniĝinta, kun la trabatita tempio kaj la sango, koaguliĝinta sur la maldelikata ĉemizo nebutonumita kaj montranta lian feran bruston.

Ĉiuj disiĝis, iuj por manĝi aŭ gastojn akcepti, iuj por prizorgi ĉevalojn aŭ sledojn.

La knabo silente staris antaŭ la maliculo, kvazaŭ iu lin forte tenis. Li ne povis diveni, kie jam vidis lin. La bildo de adventa frumatena diservo sugestis pri la maliculo: verda vizaĝo, forŝirita ĉemizo, kliniĝinta kapo... Krucumita Kristo en la granda altaro havis la saman similecon.

Do, kio estas tiu "maliculo"!

Eltirinte el lito pajleron kaj singarde sub la benko alrampinte, li pikadis en la nazon de la ŝtelisto.

– Vi estas potenca, vi povas per unusola rigardo ĵetbati min surteren, sed vi nenion povas fari al mi, – tiel kirliĝis ĥaosaj pensoj en la infana kapo.

La ŝtelisto malferminte la ruĝajn okulojn, ĉirkaŭrigardis strabe en la ĉambro.

La la mastro kiel vera bienulo, sciante, ke kun la rabisto oni devas konduki kiel leĝoj ordonas, demandis per la voĉo de vera hipokritulo:

– Eble, kara gastro, vi matenmanĝon deziras?.. Ĉu porkaĵon?



– Baldaŭ vin mi regalos per porkaĵo.

La ŝtelisto vekigis kaj eksentis, ke malfeliĉo proksimiĝas. Li decidis defendi sian "rabistan" honoron kaj respondadis per la voĉo silenta, koleron kreanta.

– Silentu, ŝtelisto. Tuj mi mortigaĉos vin ĉi tie.

– Ni ekvidos, kiu la unuan.

La kapo de la ŝtelisto resaltadis de la muro kaj la kruroj estis piedbatataj per la ŝuoj kun ferumitaj kalkanumoj.

– Ĉit! – kriis la mastro per la voĉo de laca homo, konsumita de laboroj kaj elkuris el la domo, kvankam la ŝtelisto eĉ ne intencis respondi, nur per la okuloj, plenaj de kolera fajro, akompanis la mastron.

La knabo, rampinte en plej malproksiman sublitan angulon, rigardis per la vekigintaj okuloj al ĉi tiu kruela komedio.

– Oni diras, ke paĉjo estas bona, sed kial li tiel kruise batas la ŝteliston! – dolore ekpulsis en la tempioj.

La knabo decidis liberigi la ŝteliston.

Kio estos poste, li ne zorgis ĉi-momente. Nun neniu povus lin haltigi.

Post trepasinta longa horo, kiam malfacile komencita laboro estis preskaŭ finita, li demandis:

– Ĉu vi nenion faros al mi – ĉu vi ne batos paĉjon? – Kaj kun vireca atentemo aldonis:

– Vi ja scias, mi povas vin ne malligadi!

La ŝtelisto estis preskaŭ liberigita, kaj la knabo ne povus batali kontraŭ la potenco, kiel tiu de glacioj flosantaj sur printempa rivero. La kondamnita homo silentis, enpikinte la okulojn argilplanken. Li spertis eble la plej bonajn horojn en sia vivo.

Kiam la lasta ŝnuro forglitis de la ŝtelisto, li, en la ĝibon kurbiĝinta kaj nenormala, ne hastante trafis ĉe la pordon. Ion murmurante, kvazaŭ: "Adiaŭ, infano", la ŝtelisto stringis kaj alpremis la infanon al la brusto.

"Adiaŭ" de du martiroj.

La ŝtelisto iom atendadis. Larmoj plenigis la okulojn de la knabo kaj ekgutis tra vangoj sur lian grizan, blustrietan ĉemizeton.

En lia animo ĉi-hore naskiĝinta eksonis helaj maroj de kristala kompatio.

Ĉi-tage li estis enskribita en rondon de la homoj. Li eksentis tian sopiron, kvazaŭ neniam finiĝos ĉi tiu vespero. Neniam spertinte pli grandajn misterojn, nun li eksentis multe da kareco.

Vespere la knabo ekaŭdis, ke la ŝteliston oni denove kaptis, alligis al flava sledeto kaj trenis sur neĝo, sed tiun fakton li ne esploris. Li sentis sufiĉe firman volon por estonteco.

Jurgis Savickis, Raštai I t., V.: Vaga, 1990

Esperantigis *Antanas Grincevičius*



## SKRIBU AL MI LETERON

*Ho, kia neripetebla feliĉo estas skribi  
Leterojn! Kaj ricevi. Mi ĉiutage atendas ilin. Ja tio  
estas ne nur rememoroj. Pli certe – agrablaj notoj  
per kiuj Vi vivis dum mallonga momento. Ĉiutage  
maltrankvile mi malfermas la poŝtkeston.*

*Mi ne emas paroli per telefono. En nia hejmo ĝi forestas. Mi revenas,  
brufermas la pordon - sed en mian mondon neniu eniras. Telefono – materia la  
kunlabora rimedo: "Ĉu vi ricevis? Ĉu vi havas? Kiom? Por kiom?"*

*Ĉagreniĝe, ke la plej gravaj leteroj perdiĝas en poŝtaj labirintoj.*

*Kiam la somero finiĝis, ne plu brulis, sur blanka, brilanta folieto de  
papero mi vicigis vortojn, enmetis la koron kaj espere petis: "Helpu!"*

*Mi kredis - oni skribos. Sed preterpasis somero, alvenis pluvoj, paliĝis  
daliaj floroj. Finfine min vizitis letero: "Kial vi ne skribas? Tutan someron mi  
loĝis ĝardene..."*

*Li mensogis. Kaj diskonigis, sin pravigante, ke li ne estis hejme.*

*Iu konsilis: se vi volas perdi amikojn elprovu ilin.*

*Depost tiam mi silentas. Mi punas. Pli granda puno estas nek al mi,  
nek al li. Kaj mi ankoraŭ atendas...*

*Al mi estas duoble pli pene, ĉar mi plu ne havas al kiu skribi.*

*Ĉiuj havas telefonojn ...*

*"Mi elpensis pluvon,  
Mi elpensis sunon". / Jonas Mačiukevičius/*

*Mi elpensis sunon,*

*Mi elpensis pluvon,*

*Mi elpensis feliĉon*

*Kaj ankoraŭ ion.*

*Nu, kaj se reale,*


*Tio `as nenio –*

*Nure miaj esperoj ...*

*Mi esperi ĉesu ...*

**Justina ŽUKINSKAITĖ,**

T. Tilvyčio 2, Kuršėnai 81183, Litovio

*Anstataŭ recenzo***LEGU DO!**

Al *LS* venis 159-paĝa esearo de la rakontisto kaj recenzisto Sen RODIN (Filippo Franceschi) „Nu, kaj do? Rakontoj, raportoj, recenzoj, revoj“. Estas la libro pri interhomaj rilatoj, senco de la vivo, etiko, politiko eĉ esperantologio. La verko en kiu elstaras vivpozicio de la aŭtoro. Iu verkisto rekomendis sian verkon legi tiel: tralegu la unuan ĉapitron kaj se tiu ne plaĉos, legu la duan; se ankaŭ tiu ne plaĉos – legu la trian ktp. En la preparolata libro vi ĉiam trovos ion ĝuigan – jen la enhavon, jen la lingvaĵon kaj ofte la ambaŭaĵon kune. Tio akcelas la leganton ne flankenmeti ĝin post la unua rakonto, sed legi kaj legi plu. Ni forte rekomendas al niaj legantoj legi kaj relegi la esearon pro ties glata lingvaĵo, bona stilo kaj tiel perfektigi en sia lingvoposedo.

La verkema Sen Rodin perfekte regas la lingvon. Malgraŭ tio, ke la esearo ne estas verkita en simpligita Esperanto, ĝi legeblas sufiĉe facile. Nature, ja ekde 1958 Esperanto estas ĉiutaga familia lingvo de la aŭtoro (du gefiloj estas denaskaj E-parolantoj). Akiru “Nu, kaj do?” aŭ prunteprenu ĝin por la tralego. Por ke vi almenaŭ nebule imagu spiriton de la esearo ni proponas al vi ties kelkajn pecetojn.

“Ni estis notinde strangaj. Vico el dudek homoj, silentaj, ĉiu kun sia valizeto ruliĝanta sur la asfalto kun metala grumblo, tra duonluma Satandonja, kviete dormanta malgraŭ la nokta muĝado kiu neniam ĉesas. Envere ne ĉiuj dormis. De temp` al tempo ni renkontis homojn kiuj, ekvidinte la vicon, fuĝeme malaperis en flankajn stratetojn. Kelkaj ne fuĝis sed rigardis nin kun muta suspekto. Stratvirinoj kun mikrojuoj, drinkemuloj celantaj lastan trinkejon, junaj narkotdebitantoj, ŝanceliĝantaj ebriuloj, ĉifonaj enmigrintoj serĉantaj dormejon, drogitoj, nedifineblaj uloj pene tretantaj sencelajn paŝojn: homaro streĉita, sombra, malfeliĉa, kun enfositaj okuloj kaj lantaj kruoj. Sed vidiĝis ankaŭ homoj plenumantaj noktajn laborojn: stratpurigistoj, rubuj-zorgistoj, riparistoj de tramaj relŝanĝiloj”. [.....]

“Mi vidis insulon kovritan de jarcentaj arbegoj kun trunkoj makulitaj de rustokoloraj rondaĵoj: ĉirkaŭe etendiĝis duobla vico el imponaj statuoj: aŭsteraj personuloj de forgesitaj epokoj. Apud radiko, sur densa herbo, geparo amoris. La pasantoj tanĝis ilin per simpatiaj rigardoj. Mi vidis helenan templon kun dorikaj kolonoj; juna geparo eniris tenante sin permanente; ili haltis kaj senmove kontempladis, eble aŭdante eĥojn de fora pasinto”.

*/Perdita ŝanco/*

“La militoperacio “Fandita Plumbo” estis entreprenita fare de la israela estraro kiel respondo al la ŝtato kontraŭ Israelo, far la palestina `Hamas`, de la raketoj *Kasam* kaj *Katjuŝa*, kiuj dum ok jaroj kaŭzis la morton de dek israelaj civitanoj. Ĝis hodiaŭ, unu semajnon post ĝia komenciĝo, la militoperacio kaŭzis morton de pli ol 720 palestinanoj, el kiuj almenaŭ duono estis civiluloj ...” [.....]

“Nu, la maletika nocio pri “kolektiva kulpo” estas same primitiva kaj malaminda kiel la principoj kiuj movas la fanatikulojn de ĉiu ideologio kaj religio. Ne senkiale la “kolektiva punado” estas severe malpermesata de la internacia juro. Ĉiu ajn teroristo kaj ĉiu ajn tirana reĝimo pravigas siajn krimojn ĝuste per la teorio de la kolektiva kulpo. *Al Qaeda* konsideris la homojn de la Ĝemelaj Turoj “kolektive respondecaj” pri la okcidentaj krimoj en la mondo. *Hamas* konsideras la israelajn civilulojn “kolektive respondecaj” pri la perfortoj de la israela okupado. Se ni vere intencas rifuzi tian rezonmanieron, ni ne devas indulge-senkritike adopti ĝin, kiam temas pri Gaza.

Do ni devas decide forpuŝi de ni la TRIBAN ŜOVINISMON kaj la nocion pri KOLEKTIVA KULPO! Tio koncernas ne nur la israelanojn, ne nur palestinanojn, sed nin ĉiujn”.


*/Mensa eksperimento/*

\*\*\*\*\*

*Per Esperanto – por Paco kaj Amikeco!*

### Portreta ekspozicio en sinagogo

La 7-an de novembro 2010 en Kaŭna ĉefsinagogo okazis portreta ekspozicio, eksterordinara, ja en sinagogoj oni ne licas pendigi portretojn. La aŭtoroj - distingita brita pentristo Jaspers Joffe kaj juna litova pentristo, iniciatinto de la ekspozicio, kaŭnano Gytautas Balkevičius eksponis 30 portretojn de plej elstaraj judoj de XX jarcento. Inter ili portretojn de George Michael, David Beckham, David Cameron, Stella McCartney, Alan Sugar kaj, kompreneble, de Lazaro Ludoviko Zamenhof (*G. Balkevičius*).



La vojo de G. Balkevičius al la arto kaj al la agnosko ne estis simpla. Li tiel malkovris sian interesigon pri juda kulturo: “ĉar mi ne havis monon por studi pentroarton, min instruis unu fama juda pentristo senpage”. Li klarigis, ke kun sia pli aĝa kolego J. Joffe li konatiĝis en Diuseldorf, eksciis, ke tiu originas el Litovio kaj invitis lin al Kaŭno.

L S



## **La 96-a Universala Kongreso de Esperanto**

La **96-a Universala Kongreso de Esperanto** okazos de la 23-a ĝis la 30-a de julio 2011 en Kopenhago, la ĉefurbo de Danio. Ĝis la 16-12-2010 al UK-2011 **jam aliĝis** 384 personoj el 46 landoj. Plej multaj el: Danio mem (52), Germanio (42), Francio (38), Nederlando (35), Japanio (23), Brazilo (18), Bulgario kaj Svedio (po 13). La aliĝoj plias.

La estraro de UEA decidis ke la temo de la 96-a UK de esperanto en Kopenhago rilatos al la internacia Jaro de la Junularo, kun la kongresa temo "Dialogo kaj reciproka Kompreno". Oni celas per la temo ekkapti la energion, imago-povon kaj iniciatemon de la monda junularo en venkado de la defioj, kiujn la homaro frontas, ekde fortigo de la paco, ĝis progresigo de ekonomia evoluo.



La kongreso okazos en *Bella Centro*, moderna kaj vasta kongresejo, tre facile atingebla per metroo, aŭto aŭ buso. Pere de la metroo la Centro situas nur 5 minutojn for de la Internacia Flughaveno de Kopenhago kaj 10 minutojn for de la urbocentro. En la urbo multas hoteloj. La prezoj de unudiurna restado por homo varias inter 60-90 € (hosteloj 20-40 €).

**Kopenhago - unu el la plej aĝaj kaj ĉarmaj urboj de Eŭropo atendas vin!**



Litova popola kanto  
*el regiono de Seinai*  
 (nun Pollando)

tradukis – V.Ŝilas

## TRINKU, GASTOJ, KANTU, LUDU

(Gerkit, svečiai, uliavokit)



*Trin-ku, gas-toj, kan-tu, lu-du, hej-mon ne a – lu – du. Es-tas en la*



*po-ŝo mon`, la ĉe-va-lo sub dis-pon` – plu(e) trin-ku vi!*

– Trinku, gastoj, kantu, ludu,  
 Hejmon ne aludu. 2x2  
 Estas en la poŝo mon`,  
 La ĉevalo sub dispon` – plu trinku vi!

La bieron mi prezentos  
 Kaj pri vi kontentos. 2x2  
 Estas en la poŝo mon`,  
 La ĉevalo sub dispon` – plu trinku vi!



## ESPERANTO – MOZAIKO

### ☆ Esperanto-tema opero

premieris la 15-an de septembro 2010 en Svislando. Ĝin prezentis la elektropopa ĉambro-opera grupo "Three" (*tri*), kiu estas tutmonde konata kiel eksterordinara muzika teatro sur dislimo inter elektropop-muziko kaj avangarda muziko. En la opero la utopio de komuna eŭropa lingvo bazita sur Esperanto estas lude kaj muzike traktata.

La direktoro *Javier Hagen* skribis:

“la opero temas pri Esperanto kiel nova eŭropa *Lingua Franca*.”

La grupo estis gastoj de gravaj festivaloj por Nova Muziko de Eŭropo kaj de Ĉinio, kie realigis pli ol 150 verkojn en kunlaboro kun komponistoj *Heiner Goebbels*, *Wolfgang Rihm*, *Peter Eötvös*, *Aribert Reimann*, *Mauricio Kagel*, *Huang Ruo* kaj kun multaj aliaj.”

Pli: <http://three.umsnjip.ch>

### ☆ La televida kanalo *CNN*

*Internacia* la 17-an de septembro 2010 fine de la programo *Konektante la Mondon* (Connecting the World) dissendis program-parton pri lingvoj, ankaŭ pri Esperanto. La prezentanto asertis ke milo da homoj parolas Esperanton denaske kun inter 10 kaj 2 milionoj da pliaj nedenskaj parolantoj. Poste oni skajpis kun aŭtoro de libro “En la lando

de inventitaj lingvoj”, el Philadelphia *Ariko Okrent*. Responde al la demando kial ne estu nur unu lingvo, kaj kial ne Esperanto ŝi agnoskis, ke Esperanto proponas solvon, kiu relative bone funkcias “... ”

☆ La 26an de novembro 2010 en Vilna Universitato oni solene malfermis Konfucean Instituton de Vilna Universitato. Dum la malfermo usonino ĉinologo *Deborah Sommer* (nune ŝi prelegas en la Vilna Universitato) parolante pri Konfuceo menciis Esperanton kaj tradukitajn al Esperanto tekstojn de Konfuceo. La malfermon partoprenis rektoro de la universitato *Benediktas Juodka*, ambasadoro de Ĉinio *Tong Mingtao*, ambasadoro de Japanio *Miyoko Akashi*, gastoj el Parlamento de Litovia Respubliko, Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj kaj eminentuloj el litova akademia mondo.

\*\*\*\*\*

### ⌘ KORESPONDA KESTO ⌘

Ho ve, malplenas!

Skribante korespond-peton  
bv. indiki vian aĝon, sekson,  
profesion, interesojn.



Kune kun via korespond-peto ne  
forgesu sendi al [litovastelo@takas.lt](mailto:litovastelo@takas.lt)  
ankaŭ vian foton, kiun ni publikigos  
kune kun via anonco!

# RIDETU KUNE!

## ☺ DIFERENCO

- Kiu estas diferenco inter biografio kaj membiografio?
- La biografio montras la homon tia, kia tiu estis. La membiografio – tia, kia tiu homo imagas sin esti.



## ☺ OBSERVAĴO

Pli bone esti simpla homo kun plena bierpokalo, ol pesimisto kun la duonmalplena aŭ eĉ optimisto, sed kun la duonplena.

## ☺ DIETO

Biera dieto: Lunde – biero kun rostita pano; marde – biero kun fumaĵita fiŝo; merkrede – biero kun rostaĵo; ĵaŭde – biero kun kolbasetoj; vendrede – biero kun kuiritaj fazeoloj; sabate – biero kun fromaĝo; dimanĉe – biero kun minerala akvo.

## ☺ GLASO DA AKVO

Kuracisto diras al paciento:

- Aŭskultu atente: matene – la ruĝan pilolon kaj glason da akvo; tage – bluan tablojdon kaj glason da akvo; vespere – flavan tablojdon kaj glason da akvo; antaŭ la dormo – verdan tablojdon kaj glason da akvo.
- Sinjoro kuracisto, kio okazis al mi?
- Por via organismo mankas akvo.

## ☺ ĈU LA FESTO?

Prezidanto de grava organizaĵo al sia sekretario:

- Kara, ĉu vi memoras, kiu tago baldaŭ venos?
- Certe jes! Estos jam la 15-jara datreveno kiel vi estas prezidanto kaj mi – via sekretario.
- Nu, kaj kiel ni festos la feston?
- Kiun feston?!

## PERANTOJ de LITOVA STELO

BELGIO: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 ANTWERPEN  
 BELORUSIO: Eŭgenija Pečkova, Nadeždinskaja 11-2-23, BY-220006 MINSK  
 BRAZILIO: Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, BR 70084 – 970 BRASILIA, DF  
 BRITIO: Viv O` Dunne, Stacion Road, Barlaston, STOKE-ON-TRENT, ST 12 9DE  
 ĈEĤIO: Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 PODĚBRADY II  
 DANIO: Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4.tv. DK-2100 KØBENHAVN Ø  
 ESTONIO: Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 KURESAARE  
 FRANCO: Unuiĝo Franca por Esperanto, 4bis rue de la Cerisaie, FR-75004 PARIS  
 GERMANIO: EsperantoLand e. V. Berlin, s-ro Lu Wunsch-Rolshoven,  
 Wiclfstrasse 9, DE-10551 BERLIN  
 HISPANIO: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, ES-08200 SABADELL  
 ITALIO: Viŝnja Brankoviĉ, Via Parini 5, IT-34129 TRIESTE; tel/fax +39/40/767875  
 IRLANDO: Rūta Vaičiūnaitė, DUBLINO, [ruta64@centras.lt](mailto:ruta64@centras.lt); tel. +353 8762 78929  
 LATVIO: Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, RĪGA LV-1045  
 MAKEDONIO: Esperanto-Societo "La Progreso", p.f. 197, MK-7500 PRILEP  
 NEDERLANDO: Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ ROTTERDAM  
 POLLANDO: Robert Kaminski - ul. Kwiatowa 1 m 3, PL-94-227 LODZ, [lodzano@nestrada.pl](mailto:lodzano@nestrada.pl)  
 RUSIO: Halina Gorecka, ab. ja. 1248, RU-236039 KALININGRAD  
 SVEDIO: Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 -35 HÖRBY  
 UKRAINIO: Mikaelo Lineckij, av. Heroj Stalingrada 42-v-64, UA-04213, KIEV;  
[ml@esper.kiev.ua](mailto:ml@esper.kiev.ua)  
 USONO: E.L.N.A., Esperanto-USA, 1335, Stanford Ave Suite 300, Emeryville Ca 94608

PERANTOJ ANKAŬ EN ALIAJ LANDOJ ESTIS DEZIRINDAJ!

La revuon *Litova Stelo* vi povus aboni ĉe la perantoj, ĉe la libroservo de UEA aŭ rekte ĉe la prezidanto de Litova E-Asocio (LEA, ab. d. 167, LT-44002 Kaunas-C; [litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt)).

Se vi ĝiros la pagon rekte al nia konto *litv-s* ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 Rotterdam, Nederlando, vi pri tio mem nepre informu la prezidanton de LEA (ne la redaktoron) kaj sendu al ĝi via(j)n adreso(j)n.

**LA ABONPREZOJ ĝis la jaro 2011 estas malaltaj:**

Por **Litovio**: jarabono **20 Ld**; opa n-ro 4 Lt; malnova jarkolekto 10 Ld.

Por **landoj de eksa Sovetio**: jarabono **7 €**

unuopa n-ro 1,50 €, malnova jarkolekto 4 €

Por **eksocialismaj landoj**: jarabono **10 €**, opa n-ro 2 € jarkolekto 5 €

Por **ceteraj landoj**: jarabono **14 €**, aerpoŝta aldono 6 €

opa n-ro 3 €, malnova jarkolekto 7 €

*Pro falanta kurzo de USD ni indikas abonprezojn nur en EUROj.*

**La abonado senlimdatis! - ĉiu aboninto ricevu ses numerojn de la jaro!**

*Lietuvos žvaigždė* ISSN 1648-4185 Lietuvos esperantininkų sąjungos žurnalas

2010 m. Nr.6. Baigta redaguoti 2011.02.24.

SL Nr 797. 2 sp. lankai. Ofsetinė spauda. Tiražas 600. Užs. 10-...

Spaustuvė "MORKŪNAS ir Ko", Draugystės g. 17, LT-51229 Kaunas